





La suda hemisfero, 1676



Esperanto sub la Suda Kruco

Marto-Aprilo 2001
Numero 50 (vol. 9, no. 2)



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 50 (volumo 9, numero 2), Marto-Aprilo 2001

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: donaldbroadribb@mac.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:
libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road,
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

Sur la kovrilpaĝo: Mapo pri la Suda Poluso, Aŭstralio, Nov-Zelando, kaj la pintoj de Afriko kaj Ameriko, el *La géographie universeille* de Pierre Duval, 1686. Pli da detaloj troveblas sur p.26

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

elibroj en elibrejo (Franko Luin).....	3
Du diaj monaj ridetoj (Sylvan Zaft)...	4
Skribas la legantoj	10
Esperanto en 2000 (Aleksander Korjenkov).....	11
Sukcesis en ekzamenoj.....	14
Interreto.....	15
Deziras korespondi.....	15
Raporto de la ĉefdelegito de UEA en Aŭstralio: Brian Currie.....	16
Somerlernejo januaro 2001.....	17
Omaĝe al Erol Chick	22
El la regionoj.....	24
PEAA prezidanto tutmonde honorita pro sia kontribuo al la scienco (de Odlo Boksrep	25
Nia unuapaĝa mapo detale.....	26

English Supplement

Esperanto in Forestry (by Sylvian La-fargue	
International Association of Professors Accredits AIS (by Reinhard Fossmeier)	
Our Translation Competition 2001/1 (Results and notes by Donald Broadribb)	
For Beginners (by Donald Broadribb)	

ESK estas legebla per la Interreto:
http://www.netword.com/*esk

Limdato por artikoloj por la maja numero: 20 aprilo.

eLIBROJ EN eLIBREJO de Franko Luin

Apud la tradiciaj libroj komencis aperi libroj kiuj ne tre videblas, sed kies enhavo ofte estas identa kun libroj kiuj prenas lokon en librobretoj.

Temas pri elektronikaj libroj, aŭ eLibroj, legeblaj sur ekrano. La tekniko por distribui tiajn librojn komencas esti preta nur nun, eĉ se la solvo ekzistis jam de kelkaj jaroj. Uzantoj de komputilaj programoj ofte ricevas la manlibrojn sur la kompakta disko de la programo en t.n. pdf-formato.

Eldonejoj ne ekuzis tiun formaton por distribui librojn, ĉar ne estis preta solvo kiel ili prenu pagon por tiaj libroj kaj kiel ili malebligu nelegan kopiadon. Nun tiaj solvoj estas pretaj kaj oni atendas ke baldaŭ okazos eksplodo en la eldonado de eLibroj.

Avantaĝoj...

Tiu kiu interesiĝas pri libroj scias ke ili emas okupi pli kaj pli grandan spacon en la loĝejo. eLibroj konsistas el dosieroj kiujn oni povas distribui interrete aŭ per kompakta diskoj. Unu kompakta disko povas facile enteni eĉ kelkmil diversajn titolojn, t.e. la tuta kvanto da esperanto-libroj iam eldonitaj povus facile esti transportata en poŝto (se ĝi estas iom granda).

Havigo de libro (mendo kontraŭ pago aŭ senpaga elŝuto el Interreto) estas afero de kelkaj minutoj.

Por eldonejoj estas la avantaĝo ke ili ne bezonas investi en grandan stokon da paperaj libroj kiuj eble malrapide vendiĝos.

... kaj malavantaĝoj

eLibroj postulas komputilon por esti legataj. Tiu kiu havas porteblan maŝinon povas trovi tion komforta,

sed sidi antaŭ granda peza ekrano ne nepre estas via plej ŝatata maniero legi librojn.

Komencas aperi legotabuletoj laŭ grandeco similaj al libroj, sed ili estas tro kostaj por ordinara leganto. Certe la evoluo dum 2001 rapide kondukos al pli kaj pli malmultekostaj solvoj, sed temo en ĉiu kazo pri ioma investo.

La literoj ne aperas same akre sur ekrano kiel sur papero. Ankaŭ la tekniko sur tiu kampo rapide plibonigiĝas.

Partoprenas jam dekomence

Esperantistoj partoprenas tiun evoluon de la libromerkato jam dekomence. Ekzistas jam minimume sesdeko da diversaj eLibroj aperintaj en diversaj partoj de la mondo, de Aŭstralio kaj Brazilo al Svedio. Antaŭnelonge “malfermiĝis” eLibrejo en kiu aperas informo pri senpage haveblaj eLibroj en Esperanto. Vi trovas ĝin i.a. ĉe <http://www.esperanto.se>.

Je la unua rigardo oni surpriziĝas pri la kvanto da titoloj de infanaj kaj junularaj libroj. Estas havebla preskaŭ la tuta serio de libroj pri la lando Oz kaj tri libroj pri Alico de la verkisto Lewis Carroll. Sed ankaŭ la Sveda Astrid Lindgren jam aperas en eLibrejo per *Pipi Ŝtrumpolonga*, la komenco de la libro pri *Ronjo* kaj baldaŭ ankaŭ per *Emilo en Smolando*.

Ankaŭ cetere legeblas Svedaj aŭtoroj. Reaperis pluraj libroj de Selma Lagerlöf, kiuj ne estis aĉeteblaj dum jardekoj, kaj de August Strindberg, same nehaveblaj. Kelkaj tute novaj titoloj aperas nur elektronike, ekzemple *La vojo de l' ĉielo* de Artur Lundkvist, en traduko de Bertil Nilsson.

Pretas jam kelkaj titoloj de Eldona Societo Esperanto kaj Al-fab-et-o, kiuj ekzistas ankaŭ en papera eldono, i.a. *Denaska kongresano* de Sten Johansson. La intenco estas per eLibro montri kiel interesaj la libroj estas, kaj instigi la legantojn al aĉeto de la papera eldono kiun ili povos legi komforte kuŝante sur sofo aŭ en lito.

Ĉefe reeldonoj

Cetere temas ĉefe pri reeldonoj de libroj ne plu troveblaj ĉe la libroservo. Pluraj el ili aperas en iom modernigita lingvo, precipe kiam la origina traduko estis farita kiam Esperanto ne estis tre evoluinta. Vi povas trovi en eLibrejo unu el la unuaj tradukaĵoj al esperanto, *La neĝa blovado* de Aleksander Puŝkin, farita de Antoni Grabowski en 1888; sed pli multaj devenas de la 1930-aj jaroj. Parte novtradukita estas unu el la plej amuzaj libroj kiujn mi konas, *Tri viroj en boato* de Jerome K. Jerome, kiu ekzistas nur kiel eLibro. En la pli frua traduko eĉ la titolo estis erara (*Tri homoj en boato*), tial la novtraduko estas tre bonvena. Se vi ne scias kion fari dum la kristnaskaj kaj nov-

jaraj tagoj, elŝutu tiun libron kaj havigu al vi multajn ridoplenajn horojn.

Instigas al eldonado

Ĉar eldonado de eLibroj ne estas same monpostula kiel ordinara eldonado, oni povas atendi ke la Esperanto-eldonado utiligos ĉi tiun teknikan eblecon. Verkistoj kaj tradukistoj kies manuskriptoj kuŝas en tirkestoj kaj neniam atingas la publikon povos pli facile aperigi siajn verkojn. *La vojo de l' ĉielo* de Artur Lundkvist estas tia libro, kaj same diversaj libroj kiuj direktas sin al infanoj. Ankaŭ la koncepto de eldonejo kaj librovendejo/libroservo ŝanĝiĝos, kiam verkistoj povos mem decidi pri la diversaj ŝtupoj. Estos tamen bezonataj iaspecaj perejoj kie legontoj povos ricevi informon pri ekzistantaj titoloj, kaj eLibrejo ĉe <http://www.esperanto.se> intencas esti tia perejo, kaj por la senpagaj kaj por pagendaj eLibroj. Mi volonte akceptas informojn pri pliaj pretaj eLibroj kaj povas konsili kiel pretigi novajn.

Franko Luin

franko@esperanto.se

[Represita, kun permeso, el *La Espero*] □

DU DIAJ MONAJ RIDETOJ

Rakontas Sylvan Zaft

Mia amiko Bob ne estas religia ulo sed, malgraŭ tio, dufoje mone ridetis al li Dio.

Komprenu, Bob, nun sesdekjaraĝa, ne estas malbona viro. Li karieris kiel instruisto mezlerneja, plejparte en Detroit, urbo tre granda kiu malriĉiĝas kaj kies loĝantaro malkreskas de kvar jardekoj.

Mi renkontis lin en mezlernejo kie ni kune instruis dum dek jaroj. Bob, kiel mi, estas blankulo, kaj ni estis

blankaj instruistoj en lernejoj, en lerneja sistemo, en urbo kie la plej granda parto de la loĝantaro konsistas el nigruloj.

Kiam mi renkontis Bobon je la unua fojo, li jam instruis ĉe la mezlernejo Cass dum kvin jaroj.

Cass estis tre bona mezlernejo. Nur la plej bonaj studentoj de la tuta urbo rajtis ĉeesti tie. Bonaj universitatoj feliĉe akceptis multajn kiuj sukcesis ĉe Cass. En tiu lernejo ĉiuj el

la studentoj, diference de multaj en tiu lerneja sistemo, povis bone legi, bone skribi kaj bone matematiki, kaj iuj estis elstaraj studentoj pri la teoriaj fakoj, pri muziko, kaj pri arto. (Iuj el la studentinoj estis elstare belaj. Post kiam ni emeritiĝis, du el la junaj virinoj kiuj studis tie dum niaj tieaj jaroj iĝis naciaj belulinaj reĝinoj. Unu iĝis Miss America kaj alia iĝis Miss World U.S.A.)

Antaŭ sia instruado ĉe Cass Bob havis monajn problemojn.

Komence li instruis en alia urbo, Hamtramck, tre interesa urbo ĉirkaŭita de Detroit, kiu dum la plej granda parto de la jarcento famis pro sia granda Pola komunumo. Eĉ hodiaŭ la plejparto de la loĝantaro ne konsistas el nigruloj sed el enmigrintoj el diversaj landoj de orienta Eŭropo, de la Arabaj landoj kaj de la Hindia subkontinento.

Bob decidis forlasi tiun lernejan sistemon por doktoriĝa studado pri Angla Literaturo ĉe la universitato Wayne State en Detroit. Post iuj jaroj li forlasis tiun studadon sen diplomo kaj denove serĉis laboron kiel mezlerneja instruisto.

Tiuj jaroj ne estis bonaj por tiuj kiuj deziras iĝi instruistoj. Tiuj jaroj estis jaroj en Usono kiam troviĝis tro da instruistoj. Pro tio, dum multaj jaroj Bob nur povis trovi laboron kiel anstataŭanta instruisto, tia kia instruas kiam la konstanta instruisto ne povas pro malsano, gravedeco, aŭ alia kialo. Oni pagis kaj pagas tiajn instruistojn avare.

Bob kaj lia edzino malkuniĝis kaj finfine li eksedziĝis. Li luis ĉambron en tre granda malnova domo en Hamtramck. La posedanto de tiu pensiono estis maljuna Polino. Tiam multaj aliaj luantoj loĝis en la domo.

Bob amikiĝis kun la filo de la Polino, viro kiu studis, finfine sukcese, por doktoriĝi pri Historio. Malgraŭ tio ke Bob malsukcesis doktoriĝi, tio tute ne okazis ĉar al li mankis inteligenteco aŭ klereco.

Fakte, li legis kaj legas pli da libroj ol tri ordinaraj universitataj profesoroj. Li legas multege pri historio, publikaj aferoj, internaciaj aferoj, sociaj problemoj kaj literaturo. Li tre ŝatis kaj ŝatas aĉeti librojn ĉar post kiam li finlegas libron li volas havi ĝin ĉemane por ke li povu kontroli iujn faktojn aŭ ideojn kiuj troviĝas en ĝi.

Multfoje kiam mi vizitas lin en lia nuna domo kaj ni sufiĉe profunde diskutas iun temon, li prenas el siaj libroŝrankoj libron kiu diras ion tre trafan pri nia temo. Dum multaj jaroj Bob estis malriĉulo. Li gajnis tiom malmulte instruante ke li devis labori nokte en Hamtramck kiel drinkejestro. (Li havas multajn interesajn rakontojn pri la eventoj en tiuj drinkejoj, sed tiuj rakontoj estos por alia fojo.)

Li ne havis sufiĉan monon por aĉeti novajn librojn. Do li devis aĉeti brokantajn librojn. Ade kaj ree li vizitis brokantajn librovendejojn. Li iris al ĉiaj lokoj kie oni vendas jam legitajn librojn.

Iuj almozfondaĵoj vendas tiajn librojn. Iuj ekleziejoj vendas tiajn librojn. Kelkfoje homoj ĉe si en siaj propraj kortoj aŭ aŭtomobilejoj vendas ne plu bezonatajn aĵojn inkluzive de libroj.

Ĉiajn tiajn lokojn Bob vizitis por trafoliumi kaj aĉeti librojn, librojn poemajn, historiajn, filozofiajn, vivhistoriajn, literature fikciajn ktp. Kaj ĉiam tiu malriĉulo malmulte pagis, maksimume malmultajn dolarojn, ofte nur dolaronon.

Ade lia propra libraro grandiĝis. Hodiaŭ ĝi konsistas el pli ol kvar mil libroj, el kiuj li jam legis pli ol tri mil.

Finfine Bob akiris konstantan postenon instruistan ĉe la mezlernejo Cass. Tio okazis ĉar la lernejestro preteratentis kaj permesis lin instrui en unu posteno dum tro da monatoj.

Laŭ la sindikata kontrakto anstataŭanta instruisto kiu estas en neplenigita posteno dum certa kvanto da labortagoj rajtas akiri tiun postenon konstante. Bob devis batali sindikate por siaj rajtoj sed finfine li sukcesis.

Laŭ la kontrakto la lerneja sistemo ne nur devis komenci pagi lin bone sed ĝi devis ankaŭ pagi lin kiel konstantan instruiston por la antaŭaj monatoj en tiu posteno. Oni donis al li ĉekon por miloj da dolaroj.

Li nun sentis sin preskaŭ riĉa. Tamen, pro forta persona kutimo, li plu aĉetadis nur brokantajn librojn.

La maljuna Polino mortis. La filo, nun Doktoro de Filozofio pri Historio, faris proponon al Bob.

Tiu nova doktoro decidis translokiĝi al Afriko por tie instrui Historion dum multaj jaroj. Li antaŭvidis ke post iuj jaroj li deziros reveni al Usono por serĉi postenon universitatan. En tiu onta jaro li bezonas loĝlokon por multaj monatoj dum kiuj li serĉos taŭgan postenon. Jen la propono:

Bob aĉetu la grandan malnovan domon por nur \$28 000. Pro tio ke la urbo Hamtramck iom kadukiĝis, kaj pro tio ke la ĉirkaŭanta urbo Detroit multe kadukiĝis kaj malsekuriĝis, la domoj, eĉ grandaj domoj, ne multe valoris. Eĉ kiam oni kalkulas kun tio, \$28 000 estis tre avantaĝa prezo.

Por tiu avantaĝa prezo Bob devos konsenti ke kiam la doktoro de filozofio revenos post jaroj li kaj lia edzino rajtos loĝi senpage en la domo

dum la monatoj kiam li serĉos Usonan postenon.

Dum siaj malriĉaj jaroj Bob devis vivi sen multe elspezi. Nun kiam li ĝuis bonan salajron li plu tiel vivadis. Do li ŝparis monaron kiu pligrandiĝis en la banko. Li ne deziris translokiĝi el tiu domo en kiu li jam loĝas de multaj jaroj. Do li pagis \$28 000 kaj akiris por si la domon.

Rapide Bob malkovris ke li ne ĝuas esti luiganto. Kiam luanto foriris, li ne serĉis anstataŭulon. Iom post iom dum jaroj ĉiu ĉambroluanto foriris escepte de unu. Tiu estis tre maljuna Pola viro kiu dum siaj kvar jardekoj en Usono loĝis nur en tiu domo.

La maljunulo estis vigla kaj afabla kaj Bob kaj li pace kunloĝis en tiu domo dum multaj jaroj. Bob neniam plialtigis la lupagon. Dum la jaroj tiu luprezo iĝis preskaŭ bagatela sumo, nur \$100 ĉiumonate. Kaj la ĉambroj kie loĝis la foririntaj luantoj iom post iom pleniĝis de libroj.

Kaj Bob legadis librojn. Dum la jaroj li legis centojn kaj milojn da libroj pri politiko, pri poezio, pri historio, pri literaturo, pri diversaj famuloj, pri diversaj landoj.

Post multaj jaroj la doktoro de filozofio kaj lia edzino revenis al Usono kaj loĝis kun Bob en tiu domo dum ses monatoj. Tiu filo de la antaŭa posedanto de la pensiono finfine trovis bonan postenon kaj translokiĝis al alia parto de la lando.

En la naŭdekaj jaroj la ŝtata parlamento kreis leĝon kiu permesas instruistojn emeritiĝi relative facile. Oni nur devas esti instruinta dum tridek jaroj. Krom tio, se oni pagas sufiĉe grandan monsumon oni rajtas emeritiĝi post nur dudek kvin jaroj da instruado.

Bob, ĉiam monŝparema (kiam oni legas tiom oni ne havas tempon els-

pezi multe) simple elprenis la bezonatan monon el la banko kaj pagis ĝin, kaj post la dudek kvin jaroj da instruado li emeritiĝis.

Iom post iom Hamtramck iĝis urbo kiu ne estis sendanĝera por malfortigantaj maljunuloj. Bob decidis aĉeti alilokan domon.

La domoj en la multaj prosperaj apudurboj estis tiom multekostaj ke li devus pagi ĉion kion li havas en la banko por tiea taŭga domo.

Tamen en la norda parto de la ŝtato kie loĝas malmulte da homoj estis regionoj kie li povus trovi domon ne tre multekostan. Dum la semajnofinoj li aŭtomobilis norden kaj serĉis domon.

La sola restanta luanto komencis maltrankviliĝi. "Ho, vi baldaŭ translokiĝos, ĉu ne?"

Nu, Bob ne estas religia ulo sed li ne estas kruela ulo. Li diris al la maljunulo:

"Jes, baldaŭ mi aĉetos novan domon en la norda parto de la ŝtato kaj translokiĝos tien. Malgraŭ tio, mi ne nun vendos ĉi tiun domon. Vi rajtos loĝi ĉi tie dum la tuta vivo. Ne maltrankvilu pri tio. Kiam mi vizitos ĉi tie por renkonti amikojn kaj mian filon kaj aĉeti librojn kaj kompaktdiskojn en la brokantaj vendejoj, mi dormos ĉi tie en mia dua domo."

Kiel li diris, tiel li agis. Li translokiĝis al domo kiun li aĉetis je distanco de pli ol tri cent kilometroj for de Hamtramck. Tiu domo lokiĝas du kilometrojn sude de urbeto kiu havis nur mil loĝantojn.

Bob nun posedis kvin hektarojn da tero kampa kaj arbara. En la ĉambroj de tiu domo estis spaco por miloj da libroj kaj miloj da kompaktdiskoj, ĉar Bob akiradis tian novan aron. Li tre ĝuis muzikon, ĵazan kaj klasikan, kaj en tiu norda parto de la ŝtato li opini-

is ke ne ekzistas radiodissendado de tiaj muzikoj. Pro tio li decidis aĉeti multajn brokantajn kompaktdiskojn.

Antaŭ ol li translokiĝis li trovis duan luanton, bonsanan mezaĝan viron al kiu li luigis ĉambron por la sama bagatela sumo kiel la sumo kiun pagis la maljuna Polo. Tamen al tiu viro li diris:

"Vi pagu malmulte sed tial vi prizorgu iom la domon kaj la maljunulon. Kiam tiu mortos, mi vendos la domon kaj vi devos foriri."

"Konsentite," diris la alia, feliĉa pro la eta lupago.

Verdire la domo ne valoris multe. Pro la kadukiĝo de la urbo la domoj de Hamtramck ne akiris pli da valoro, diference de la domoj en la prosperaj apudurboj.

Dum jaroj Bob loĝis en la norda parto de la ŝtato kaj legis kaj aŭskultis muzikon kaj promenis en la arb-aro kun biglo¹ kiun li aĉetis.

Kutime ĉiumonate li aŭtomobilis al Hamtramck kaj restis tie dum du aŭ tri tagoj. La maljunulo prizorgis la biglon dum tiuj vizitoj.

Finfine, post iuj jaroj la maljunulo ekmalsaniĝis kaj post monato mortis.

Bob, laŭ sia decido farita antaŭ jaroj, decidis vendi la domon. Li trovis tre interesan makleriston, junan Polan virinon kiu enmigris Usonon antaŭ nur malmultaj jaroj. Ŝi estis brila makleristo. Ŝi posedis multekostan aŭtomobilon. Ŝi vizitis lin en la domo en Hamtramck kaj metis sur la tabl- on dikan stakon de kopioj de dokumentoj:

"Jen la domoj kiujn mi vendis ĉi tie ĉi tiun jaron! Se vi permesos, mi vendos la vian por bona monsumo."

¹ Tre malgranda speco de leporhundo.

“Por kiom da mono?”

“Por okdek mil dolaroj.”

Bob eksciis ke dum la jaroj kiam li loĝis en la arbara parto de la ŝtato la valoro de la domoj en Hamtramck iom post iom pligrandiĝis. Junaj homoj iris tien pro tio ke la kosto de konstruaĵoj estis malalta. Junaj muzikistoj kaj artistoj translokiĝis tien. Multaj kafejoj kaj drinkejoj kie oni muzikas malfermis siajn pordojn. Koncertoj aŭskultiĝis. Do la domo kiun Bob aĉetis por nur \$28 000 vendiĝis por \$80 000. Bob gajnis dekmil-ojn da dolaroj pro tio ke li ne tuj vendis la domon kiam li emeritiĝis kaj translokiĝis, pro tio ke li ne volis esti kruela al la Pola maljunulo kies nura Usona hejmo estis tiu domo.

Bob diris al mi: “Se mi estus religia ulo, mi kredus ke Dio mone ĉi tiel benas min pro tio ke mi afable agis al la maljunulo. Sed mi ne estas religia ulo. Tio nur estas hazarda okazo.”

Kiam Bob decidis emeritiĝi li klopodis konvinki aliajn kuninstruistojn agi same, kaj li sukcesis konvinki min.

Ni du emeritiĝis en la sama jaro, li post dudek kvin instruaroj kaj mi post tridek tri instruaroj. Li havis nur kvindek du jarojn. Mi havis kvindek sep jarojn.

Ekde tiam trifoje ĉiujare mi vizitas Bobon dum kvin tagoj. Ni parolas multe, pri historio, pri muziko, pri literaturo, pri politikaj eventoj.

Ni argumentas filozofie. Ni promenas kun la biglo en la arbaro. Ni vizitas urbojn en la regiono. Matene ni aŭtomobilas al urbo kiu lokiĝas tridek kilometrojn oriente de la domo de Bob, de tiu domo kiu nun estas la sola domo kiun Bob posedas. Ni trinkas kafon kaj babilas kun aliaj emeritoj.

Tiuj vizitoj estas agrablaj eventoj

en mia vivo ĉar mi ne konas multajn homojn kiuj fervore interesiĝas pri tiaj temoj kiajn Bob kaj mi ŝatas esplori.

Mi ofte parolis al Bob pri mia komputilo kaj ties utileco. Li ĉiam diris al mi ke komputiloj por li estas tre konfuzigaj.

Subite antaŭ jaro Bob diris al mi: “Mi devas aĉeti komputilon.”

Tio ege surprizis min ĉar kiam Bob skribas li nur manskribas. Li eĉ ne uzas tajpilon. Pli ol unu fojon li diris al mi ke li esperas fini siajn jarojn sen posedi komputilon. Kiam mi preparolis ĉion kion mi faras per mia komputilo li aŭskultis sed li tute ne povis kompreni kiel funkcias komputilo kaj Interreto.

Sed nun Bob diris al mi: “Mi devas aĉeti komputilon. Vi spertas pri komputiloj. Ĉu vi kompleksus helpi min tiurilate?”

“Plezure,” mi diris, “kaj mi instruos vin pri tio. Sed kial vi tiel subite decidis tiel?”

Bob detale respondis dum veturigo al urbeto je distanco de dek ok kilometroj. En tiu urbeto duono el la domoj estas sen loĝantoj. Bob klarigis al mi ke li ĉiam serĉas brokantajn librovendejojn kaj en la lasta telefonlibro li ekvidis novan tian vendejon en la duone malplenigita urbeto.

Li vizitis la librovendejon kaj trovis tie tre grandan aron da libroj. Li trovis iujn interesajn librojn. Tamen la prezoj de multe el tiuj estis tro altaj. Kiam li pagis por iuj libroj kiuj ne estis tre altkostaj li babilis kun la geedza paro kiu posedas la vendejon.

“Mi supozas ke malmultaj homoj vizitas ĉi tiun vendejon.”

“Preskaŭ neniu. Vi estas la nura kiu vizitas nin hodiaŭ.”

“Mi ne komprenas. Kiel vi povas gajni monon ĉi tie.”

“Ho, rigardu tiujn komputilojn. Ni uzas Interreton. Ni vendas librojn al homoj tra la tuta lando kaj eĉ al homoj en aliaj landoj.”

“Ho, pro tio la prezoj de multaj viaj libroj estas pli altaj ol antaŭe.”

“Jes ja. Nun la libroŝatantoj de la tuta lando povas aĉeti ĉe ni. Ili nur bezonas komputilon kaj alligon al Interreto.”

Bob kaj mi alvenis al la librovendejo. Ĉe la alia flanko de la strato estis malgranda poŝtofiĉejo. Dum Bob serĉis interesajn librojn mi parolis kun la virino.

Ŝia edzo estis for en pli norda parto de la ŝtato, en la norda duoninsulo Michigan kie li aĉetas librarojn de diversaj homoj, ankaŭ de posedantoj de heredaĵoj :

“Ĉiam ni devas havigi al ni pli da libroj ĉar senĉese vendiĝas la libroj.”

Ŝi klarigis al mi la sistemon. Estis iuj retlokoj kie librovendantoj povas aperigi la titolojn de la libroj kiujn ili proponas vendi. Ili devas pagi iom, sed ne tro, al la firmao kiu posedas la retlokon.

Homoj kiuj deziras aĉeti librojn povas kontakti ilin aŭ elektronike aŭ telefone.

Eĉ okazas, kiam oni interesiĝas pri tre malofta kaj multekosta libro, ke aĉetanto vojaĝas al tiu duone forlasita urbeto por preni libron en siajn manojn por decidi ĉu ĝi vere valoras la prezon.

Iu ajn povas viziti tiujn retlokojn kaj tuj ekscii la nunajn prezojn de iuj ajn brokantaj libroj.

Tial Bob bezonis komputilon. Tion li deziris fari pri siaj kvar mil libroj.

Ni vizitis grandan vendejon en la plej granda urbo en tiu regiono de la ŝtato kaj mi helpis lin aĉeti novan komputilon.

Li diris al me, “Ne zorgu pri la kosto. Eble tiu estos la nura komputilo kiun mi aĉetos en mia tuta vivo.”

Ni alportis la komputilon ĉe lin. Mi helpis lin kunmeti la erojn de la komputila sistemo kaj dum tiu vizito kaj dum sekvantaj vizitoj mi instruis lin pri la uzado de la komputilo kaj de Interreto.

Inter la vizitoj, per la komputilo Bob kreis liston de ĉiuj siaj libroj, listo kiu estis preskaŭ libro. Li kreis la liston alfabete laŭ la aŭtoro.

Li serĉis la valoron de iuj siaj libroj, tiuj kiujn li sciis esti tre tre maloftaj.

Nu Bob estas tia leganto kia, kiam li trovas aŭtoron kies librojn li ĝuas, deziras aĉeti kaj legi ĉiujn el ties libroj.

Ekzemple, li havas bretojn kiuj portas preskaŭ ĉiujn librojn de John Updike.

Do dum la jardekoj kiam li aĉetas brokantajn librojn okazas ke li trovas kaj aĉetas tre fruajn librojn de ontaj famaj aŭtoroj. Tiajn librojn de ankoraŭ ne fama aŭtoro oni presas je malgrandaj kvantoj. Ili iĝos maloftaj libroj kaj, pro la finfina famo de la aŭtoro, altekostaj, ofte ege multekostaj.

Uzante la komputilon, vizitante tiujn brokantajn retlokojn dum multaj horoj esplorante, Bob eksciis la nunajn prezojn de multaj liaj libroj.

Plejparte tiuj valoras nur iujn dolarojn aŭ eble dek ĝis dudek dolarojn.

Sed proksimume ok cent el tiuj valoras ege pli. Multaj valoras dekojn da dolaroj. Aliaj valoras po pli ol cent dolarojn. Iuj estas altevaloregaj.

Ekzemple, iuj el tiuj valoras po kvar cent dolarojn aŭ po ses cent dolarojn aŭ eĉ po pli ol mil dolarojn. Iuj tiaj libroj kostis al li malpli ol unu

dolaron.

Bob ne bezonas la monon. Li ne intencas vendi la librojn. Tamen li informis sian filon ke, post kiam Bob mortos, la filo ne vendu la librojn por malgranda monsumo. Tiu konsultu la liston en kiu Bob skribis la prezojn

Interretajn kaj li Interrete rekontrolo la valoron de ĉiu libro el la patra heredaĵo.

La nuna valoro de la biblioteko de Bob estas, li taksas, inter \$150 000 kaj \$200 000.

Denove, al li Dio mone ridetas. □



Skribas la Legantoj



Skribas Franciska Toubale:

Mi ne bedaŭras ke mi endanĝerigis mian memfidon kiel instruisto partoprenante la konkurson pri la uzo de -us. Finfine mi decidis testi ĉu mi bone komprenas la problemon aŭ ne tute. Sed mi ne antaŭvidis ke tio donos al mi la oportunon pasigi kelkajn agrablajn horojn kun *La profesoro kaj la vidvino* de Ron Gates. Kompreneble ĝi jam estas recenzita. Sed kial ne memori la legemulojn kiuj ankoraŭ ne malkovris ĝin?

La aŭtoro ne nur sukcesas kroĉi la scivolemon de sia leganto, konforme al tiu ĝenro, detektiva novelo — oni demandas sin ĝis la fino, kiu estas la malbonulo, kiu mensogas, ĉu la profesoro kapablos montri sin pli firma — sed li ankaŭ informas pri ekonomikaj problemoj. (Domaĝe ke ne ĉiu parlamentano legis la libron antaŭ ol voĉdoni por la nova impostsistemo, la ĝenerala imposto super elspezoj).

Mi aldonos ke pro la detalemo de la verkisto kiam li priskribas eĉ ĉiutagajn gestojn, la vortoprovizo estas vera trezoro.

Jen mia lasta rekomendo: evitu legi ĝin en trajno, vi riskos mistrafi la

celitan stacion.

Skribas Margaret Furness:

Niaj kvin Esperanto-arboj bele kreskas, sed bedaŭrinde la nomŝildoj refoje malaperis. Do ni aranĝis malŝteleblan (ni esperas!) Zeon¹. En la bestoĝardeno, oni kreas Promenejon por la Jarmilo (Millennium Walk). Sur unu pavimero estos gravurita “Esperanto por Paco”. Per vendado de gravur-raĵoj la bestoĝardeno gajnos monon por helpi al maloftaj bestoj.

Skribas Dudley Parkinson:

Mi volas diri ion pri du el la “necesaj neologismoj” pri kiuj verkis Marcel Leereveld en *ESK* jan.-feb. 2001, p.11, 13.

(1) Eble la substantivo SISMO ne estas bezonata, sed la radiko SISM- nepre bezoniĝas. SISMILO, ekz., legas la ondojn de tertremoj, sed ankaŭ de eksplodoj kaj eĉ frapoj per martelo. Sisma aparato ne egalas al tertrema aparato.

¹ ZEO = Zamenhof/Esperanto-objekto, t.e. publika monumento omaĝe al Zamenhof aŭ al Esperanto.

(2) SUDPOLUSA ne egalas al ANT-ARKTA, kiel Alice Springs ne egalas al Aŭstralio: mi loĝis dum mallonga

tempo en Antarkta loĝejo, sed mi estis trimil kilometrojn for de la Suda Poluso. □

ESPERANTO EN 2000 de Aleksander Korĵenkov

Verkote revuon de la jara aktivado mi kelkfoje pensas ke eble estus preferinde skribi simile al malnova Rusa kronikisto: “En ĉi tiu jaro okazis nenio”. Sed ĉar la organizantoj de la Zamenhofa Tago en Jekaterinburg ĉiujare petas min rakonti pri la plej interesaj eventoj kaj tendencoj en Esperantio dum la pasinta jaro, mi cedas al ilia insisto. Ja la tradiciaj panoramaj artikoloj similas al la tagĵurnaloj kiuj, laŭ Karel Čapek, “ĉiumatene aperas, eĉ se dum la antaŭa tago okazis absolute nenio”.

Sed oni ne povas diri ke okazas nenio en Esperantio, baze difinebla kiel aro da dise loĝantaj homoj kiuj fordonas al Esperanto parton de sia libertempo. Kvankam laŭnombre Esperantio ne superas urbon kun cent mil loĝantoj, ĉiujare en ĝi okazas centoj da diversspecaj renkontiĝoj, funkcias kelkaj miloj da klub(et)oj kaj asocioj, aperas multaj gazetoj kaj libroj.

Malpli amase

Malgraŭ la nestabila situacio kaj eventuala bojkoto, UEA decidis kongresi en Tel-Avivo, kaj ĉi tiu kongreso iĝis la malplej amasa UK de la lasta jardeko, eĉ malpli granda ol la Aŭstralia UK (1997). Bedaŭrinde, partoprenis neniu Esperantisto el la Arabaj landoj, kie UEA provas organizi kampanjon, kaj la postkongresa rebrulo de la konflikto en la regiono verŝajne rapide forgesigis ke “pacaj batalantoj” ĉi-jare unuafoje kongresis

en la Sankta Lando.

Malpli grandaj ol kutime estis ankaŭ la kongresoj de TEJO (Hongkonĝo) kaj SAT (Moskvo), kiuj logis malpli da personoj ol, ekzemple, la fervojista kongreso en Budapeŝto, landaj kongresoj en Brazilo, Japanio kaj Litovio, junulara festivalo apud Venecio, kaj ĉiu el la du jar-ŝanĝaj renkontiĝoj en Germanio.

La magreco de tiuj kongresoj ŝrumpigis la membronombron de la organizintaj asocioj. Unuafoje post 1986 la individua membraro de UEA ne atingis 7 mil. La membraro de TEJO falis al sub 700, kaj SAT raportis pri nur 930 anoj. Supozeble en 2001 la kongresoj en pli allogaj landoj (Kroatio, Francio, Hungario) plimultigos la kongresanaron kaj la membraron, tamen la membrokrizo devas atentigi la asociajn respondeculojn pri pli adekvata interna politiko.

Cetere la 4a Eŭrop-Unia kongreso estis sukcesa kaj kvante kaj kvalite — Esperanto plu restas plej disvastigita ĝuste en Eŭropo.

Kion ni diskutas?

Efektive, en Eŭropo loĝas pli ol duono de la membroj de UEA kaj SAT, kaj tie kutime okazas iliaj kongresoj. Aliaj internaciaj asocioj, ekzemple OSIEK kaj LF-koop, ankoraŭ neniam okazigis siajn ĉefajn aranĝojn ekster Eŭropo. La agado de ERA, EEU, kaj diversaj sendependaj iniciatoj (precipe la informa aktivado de Dafydd ap

Fergus) metas en la tagordon la demandojn pri pli kunordigita agado en Eŭropo, interalie pri malfermo de oficejo en Bruselo. Probable pro la Eŭropa jaro de lingvoj (2001), “Esperanto en Eŭropo” plu restos la ĉefa diskuttemo en Esperantio.

La alia ofte traktata temo en 2000 estis la evoluo kaj strategio de la Esperantista komunumo, kiu devas ŝanĝi sin adapte al la rapide ŝanĝiganta mondo, por ne iĝi areto de kurirozaj manietuloj.

En Tel-Avivo diskuto estis lanĉita pri la nova strategio de UEA, kiu daŭrigos Kampanjon 2000 (ĉu tiu estas plenumita?). Tamen la publikigita projekto apenaŭ serioze konsideras la Berlinan proponon de Enderby, laŭ kiu UEA iĝus “asocio por la homaj rajtoj, kiu uzas Esperanton, kaj kies politiko estus disvastigi Esperanton pli forte ol nun pere de ĉefa pledo pri homaj rajtoj aŭ, se vi permesas, civilaj liberecoj”.

Se temas pri la homaj rajtoj, la rajtojn de la Esperantistoj intencas defendi la Esperanta Civito, kiu fondiĝos en junio 2001. Kvankam ĝuste la Civito estas inspirata de raŭmaj ideoj, la ĉefa omaĝo al la Manifesto de Rauma (1980) okazis en ties naskolando Finnlando kadre de seminario “20 jaroj post Raŭmo” preparita de Jouko Lindstedt, unu el la tri kunaŭtoroj de la dokumento, kies tezoj estas diskutataj ankoraŭ nun.

44 jarojn post la Principaro de Frostavallen, UEA pretigis Gvidliniojn por informado pri Esperanto. Malkiel la antaŭa dokumento, ĝi ne listigas la ĉefajn erarojn en informado, nek donas konsilojn pri insignoj kaj vestaĵoj, sed proponas “konsciigi la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj pri la ekzisto de tutmonda, egalece funkcia lingvo-

komunumo, en kiu ĉiuj bonvenas”. Ĉu komenciĝas distanciĝo for de “dua lingvo por ĉiu” kaj konceptado de Esperanto kiel la ĉefa komuniklingvo ene de nia malgranda grupo kun propraj tradicioj kaj interesoj?

Ekstere

Sendepende de la respondo al ĉi tiu demando, UEA daŭrigas sian eksteran agadon, precipe inter neregistaraj organizaĵoj. Ĝi reprezentigis, interalie, en Jarmila Forumo de NROJ¹, Konsulta Komitato de UNESKO por Lingva Plureco kaj Multlingva Eduko, Kongreso de Internacia Asocio de Edukistoj por Monda Paco, kaj en kolokvo “Kulturo de paco: aganta ideo”. Eŭropa Esperanto-Unio lanĉis proponon pri Konstanta Konferenco pri la Lingvoproblemo en Eŭropo. Esperantistoj (kun)manifestaciis sur stratoj de Parizo kaj San-Paŭlo.

Sed eble la plej interesaj eksteraj iniciatoj estas la projektoj *Indiĝenaj Dialogoj* kaj *Interkulturo* (al ĝi aliĝis jam cent klasoj), kaj la movado por Lingvaj Festivaloj. Tiujn festivalojn okazigas junularaj Esperanto-grupoj por prezenti diversajn lingvojn kaj iliajn kulturojn — kompreneble kun emfazo pri Esperanto.

La kultura jaro

Kvankam la movadaj kongresoj de UEA, SAT, kaj TEJO ĉi-jare ne povas esti nomitaj sukcesaj, tiun epiteton meritis la du festivaloj de la Esperanto-kulturo en Francio (KAFFE) kaj en Finnlando (KEF). Precipe multajn pozitivajn reagojn vekis KEF 2000 en Helsinki pro la elstara programo muzika, poezia, kaj teatra, kaj pro la entuziasmiga etoso reginta dum ĝi. Ĝuste antaŭ la festivaloj VINILKOSMO

¹ NRO = Ne-Registaraj Organizaĵoj.

finrealigis sian projekton Kolekto 2000 de dek kompakt-diskoj kun junulara muziko. Kaj de Moravia Filharmonio estis prezentita la *Esperanta Simfonio* de David Gaines por mezsopranulino kaj orkestro.

Plu aktivas eldonemuloj. Surmerkatiĝis gravaj tradukoj: *La lada tambureto* de Gunter Grass, *Resurekto* de Lev Tolstoj, *La hobito* de Tolkien, *La ŝaŭmo de l' tagoj* de Boris Vian. Inter la libroj originale verkitaj en Esperanto estas menciendaj *Surklifa* de Sergo Elgo kaj *Neniu ajn papilio* de Trevor Steele (laŭreato de OSIEK-premio pro alia libro).

Tiuj aferoj nun ŝajnas preskaŭ same ordinaraj kiel UKoj, sed ni nepre ne forgesu ke en la epoko de "vinilaj diskaj" oni simple ne havis popularan dancmuzikon en Esperanto, kaj ke dum 1950-79 (tridek jaroj) estis eldonitaj malpli ol 20 romanoj originale verkitaj en Esperanto.

Gazete

Sed la kultura gazetaro ne progresas. Plu falas la abonantaro de *Kontakto*. Post la malapero de *Iltis-Forumo* kaj *Riveroj* ĉesis aperi *Kulturaj Kajeroj*, kaj aŭtune Esperanton konsternis informo ke ekde 2001 *El Popola Ĉinio* aperos nur elektronike.

Pro la paŭzo de *La Brita Esperantisto* (eble la plej leginda nacia Esperanto-gazeto en la jaroj 1990aj), la Estraro de EAB decidis ke al la membroj de la asocio estu provizore sendata *La Ondo de Esperanto*. Dank' al la nova redaktoro, Stano Marček, *Heroldo de Esperanto* plibonigis siajn enhavon kaj aspekton.

La movadaj gazetoj evoluas en konkurenco kun la kreskanta retinformado, per kiu rapide kaj nemultekoste (ofte senpage) estas disvastigataj novaĵoj kaj opinioj. Pli ol

du mil Esperantistoj jam registriĝis en la publike atingebla adresaro, kaj supozeble pli multaj uzas la reton sen anonci sin (por eviti nedeziratajn sendaĵojn). Sed krom kunigi la homojn Interreto ankaŭ disigas ilin. Ekzemple, multaj ret-aktivuloj ne atentis la aliajn aplikosferojn de Esperanto. Krome, nurrete disvastigata materialo (ekzemple, pri kelkaj Esperanto-renkontiĝoj) ne atingas la pli grandan parton de la Esperantistaro, kiu ne havas ret-aliron.

Menciendaĵoj

— Antaŭ la Tel-Aviva UK, en Amano UEA okazigis sian unuan seminarion por Arabaj Esperantistoj.

— En Britio ekagis Esperanto-partio.

— *Pasporta servo* unuafoje listigis pli ol mil adresojn.

— Reaktiviĝis Pola Esperanto-Junularo.

— Kastelo Greziljono kaj Esperanto-redakcio de Radio Aŭstria Internacia sukcesis daŭrigi sian agadon malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj.

— Fondiĝis Astronomia Esperanto-Klubo, kiu jam okazigis fakan seminarion kaj eldonis jaran almanakon.

— En Torun (Pollando) okazis la jubilea 20a Internacia renkontiĝo de popolaj orkestroj.

— *Yomiuri Shinbun*, *USA Today*, kaj *The Times of India*, ĉiu kun milionoj da legantoj, pozitive informis pri Esperanto.

— Ekde marto Barbara Pietrzak eklaboris, post Andrzej Pettyn, kiel estro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio.

— William Auld iĝis laŭreato de la 7a Esperanto-Kulturpremio de Aalen.

— Ne unu, sed tri personoj (Hans Bakker, Jouko Lindstedt, Mauro La Torre) estas proklamitaj la "Esperan-



Foto: John Gallagher

Mac Lefevre, Dudley Parkinson, kaj aliaj Esperantistoj rigardas la arbon kiu plantiĝis nome de la internacia lingvo Esperanto ĉe la “Arbaretum” en bela norda Tasmanio. Ili kunvenis en decembro por festi la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof.

tistoj de la Jaro 2000”.



Enirante en la trian jarmilon, ni memoru pri la samideanoj kies vivo ĉesis en la pasinta jaro. Por ĉiam forlasis nin Martha Andreasson, Zsuzsa Barcsay, Ingemund Bengtsson, Stanislava Chrdlova, Rüdiger Eichholz, Thomas A. Goldman, Jiri Karen, Leopoldo Knoedt, Karl Maier, Jan Stronne, Anton Zacharias kaj aliaj meritplenaj Esperantistoj.

Foriras la malnovaj generacioj, venas la novaj. Laŭ Kep Enderby: eĉ se la revoj de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri ke la fenomeno Esperanto sendube sukcesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento. Esperu je pli estis utopie kaj tro optimisme.

De ni, nuntempuloj, dependas la

estonteco de Esperanto. Se ni faros nenion, pri Esperanto memoriĝos eble nur muzeoj, bibliotekoj kaj la subneĝa Mesaĝo por venontaj generacioj, metita en Antarkto la 27an de aprilo 2000 memore al Monda Scienca Pintkunveno — dank’ al aktivuloj de Argentina Esperanto-Ligo, unu el la kvin lingvoj de la mesaĝo estas Esperanto.

[Reprezita kun permeso el
La Ondo de Esperanto.] □

SUKCESIS EN EKZAMENOJ

Baza

Betty Batt (NSW)
John Harvey (WA)
Jo Horton (NZ)

Meza

Christian Krägeloh (NZ)
Penelope Vos (WA)

Supera

Sid Wolifson (NSW)

INTERRETO

Novaj informoj

• **Nova diskutlisto de UEA:** listo estas kreita: <individuaaj-membroj@egroups.com>, per kiu la individuaj membroj de UEA povas diskuti pri ĉiuj aspektoj de la agado de UEA. Se vi estas individua membro de UEA (la informo estos kontrolita de la direktoro de la CO), vi rajtas aliĝi per mesaĝo al: <reto@uea.org>. En la mesaĝo menciu viajn nomon kaj UEA-kodon. Se vi ne memoras vian kodon, aldonu vian adreson.

La listo estos daŭre sekvata de almenaŭ unu estrarano de UEA (en la komenco la ĝenerala sekretario: Mikela Lipari), kiu respondos kolektive ĉiun duan semajnon.

Reguloj de la listo estas: mallongaj mesaĝoj, malpermeso pri personaj insultoj, respekto al la statuto de UEA, kiam temas pri la pritraktataj temoj.

[E1 Eventoj]

• **E-poŝtaj adresoj:** Aldonu al la

listo en nia januara numero:

Les Owen <lesowen@hotmail.com>

• **David Poulson** ricevis la ĉisekvan mesaĝon: Your website, <http://www.suite101.com/welcome.cfm/esperanto>, has been selected as a featured site in Lightspan's StudyWeb as one of the best educational resources on the Web by our researchers. You will be able to view it in our "Language Arts:Languages:Esperanto" section very soon.

StudyWeb is one of the Internet's premier sites for educational resources for students and teachers. Since 1996, our expert reviewers have scoured the Internet to select only the finest sites to be included in StudyWeb's listing of educational links. Each site in StudyWeb includes a detailed review describing its editorial and visual merits. □



Dezirata Korespondi



ANDRÉ MOLLARD, 89 rue Sommeiller, F-73000 Chambry, Francio. 55-jara fraŭlo, emerita unuagrada instruisto, serĉas plumamikojn en Nov-Zelando. Li kolektas uzitajn poŝtmarkojn pri la vivmaniero, historio, naturo, kc.



POR RIDIGI
VIN



Esperanto Noblat Jr
de Aloisio Sartorato

Iam, en la okdekaj jaroj, mi renkontis homon kiu nomiĝis "Esperanto" (antaŭnomo). Mi estis parkumanta mian aŭtomobilon kaj mi perceptis ke iu tak-

sio haltis proksime de mia veturilo. El ĝi eliris la ŝoforo, kiu sin direktis al mi.

Estis vintro kaj la loko estis iom malluma. Mi timis, sed la homo tuj tranviligis min, dirante ke li ne volas rabi min. Kaj li tuj demandis al mi:

“Ĉu vi nomiĝas Esperanto?”

Kaj mi respondis: “Tute ne! Mi estas instruisto de Esperanto. Kial vi demandas tion al mi?”

Kaj li respondis: “Ĉar mi mem nomiĝas Esperanto Noblat Jr, filo de Esperanto Noblat.”

Mi demandis: “Ĉu vi estas Esperantisto?”

Kaj la homo respondis: “Ne!” (Fakte li estis simpla homo kaj tucerte ne interesiĝis pri lernado de lingvoj.)

“Sed kial vi nomiĝas Esperanto?”

Li diris: “Mia avo elektis tiun nomon por mia patro, kaj li ŝatis ĝin kaj ankaŭ nomis min Esperanto. Mi decidis alproksimiĝi al vi, ĉar mi vidis sur la malantaŭa glaceo de via aŭtomobilo tiun gluafiŝon ESPERANTO — LINGVO INTERNACIA, kaj pro tio mi pensis ke vi ankaŭ nomiĝis Esperanto.”

Tia estis la tago kiam mi konis homon kiu fakte nomiĝis Esperanto.

El *Brazila Esperantisto*, Dec. 2000

kui prenis la tekston el *Veki* 17/09/2000. □

RAPORTO DE LA ĈEFDELEGITO DE UEA EN AŬSTRALIO: BRIAN CURRIE

Ĝenerale oni devas diri ke la Delegita Reto ne estas tre aktiva en Aŭstralio. La ĉefa kialo estas ke Aŭstralio estas geografie izolita disde la cetera mondo, kaj precipe dosde Eŭropo, kie aktivado per Esperanto estas plej granda. Alia faktoro estas la lingva unueco de la kontinento, pro kio ĉiuj vizitantoj devas almenaŭ supraĵe koni la anglan, do la bezono je Esperanto estas malpli.

Tamen preskaŭ ĉiuj delegitoj iam tiam ricevas iajn petojn. Precipe temas pri petoj por korespondado. Duavice alvenas petoj ke delegitoj renkontu alvenontojn ĉe stacioj kaj flughavenoj, ofte kun la antaŭsupozo ke ili ankaŭ manĝigos kaj ĉiĉeronos ilin. Bedaŭrinde ekzistas multe da “verdaj puloj” kiuj trasaltas la mondon per supraĵa kono de Esperanto kaj surda orelo al pli delikataj sugestoj ke ili jam foriru... ho ve. Tiaj spertoj jam senluziigis kelkajn bonulojn (ne nur delegitojn) konatajn de mi. Mi ĉiam avertas delegitojn ke ekzistas, laŭ la Regularo, neniu devo fari tiajn komplezojn, sed ofte scivolo estas pli forta ol singardemo. La roloj de la Pasporta Servo kaj la Delegita

Reto ne bone distingiĝas en la mensoj de la plejmulto.

Ĉar mi persone loĝas en loko iom distanca de la ĉefaj centroj, mi malofte spertas tiajn petojn. Plej ofte temas pri petoj, alvenantaj per tradicia aŭ komputila poŝto, provizi ian informon, precipe pri laborkondiĉoj en Aŭstralio, agnosko de profesiaj kvalifikoj, akiro de laborvizoj, turismo ktp. Mi sekvas la rekomendojn en la Regularo kaj kelkfoje jam ne respondis petojn kiuj ne plenumis la kondiĉojn. Tamen mi iam respondis kaj helpis, nur ĉar la petinto ŝajnis al mi simpatia.

Ĉu eblas vigligi la Reton en Aŭstralio? Ĉefe tio dependas de la ĝenerala vigleco de Esperanto en la lando. Parte pro la faktoroj kiujn mi menciis supre, la movado estas izolita kaj iom sekteca. La ĉefaj aktivaĵoj estas la iom flagra ekzistado de kluboj, amatora instruado je loka nivelo, kaj la ĉiujaraj Somerkursaroj, kiuj tamen precipe altiras nur Anglalingvanojn. La ĉefa kvalito de Esperanto, nome ĝia granda utileco en internacia medio, ne estas facile distingebla en tiaj cirkonstancoj. □

LA ĜENERALA KUNVENO DE AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Sabato 20an de januaro 2001.

La Estraro de AEA nun estas:

Prezidanto: Jennifer Bishop
Vicprezidanto: Franciska Toubale
Vicprezidanto: Hazel Green
Sekretario: John (Ĝono) Gallagher
Vicsekretario: Bob Felby
Kasisto: Stephen Pitney
Vickasisto: Frank Braham

Landa reprezentanto de Suda
Aŭstralio: Sandor Horvarth
Okcidenta Aŭstralio: DebraMcCarney
Suda Aŭstralio: Sandor Horvath
Kvinslando: Kay Anderson
Tasmanio: Dudley Parkinson
Reprezentantoj de NSW kaj de Vikto-
rio: ankoraŭ ne nomumitaj

LA 17-a AŬSTRALIA SOMERKURSARO DE ESPERANTO

en Melburno 13an-22an de januaro 2001.

Raporto kompilita laŭ kontribuoj de
Jennifer Bishop kaj John Gallagher

Bela somervetero salutis la 82 partoprenantojn el 9 landoj ĉe Internacia Domo, kolegio de Universitato de Melburno. Ampleksa programo de Esperanto-lingvokursoj je kvar niveloj allogis la studemulojn, aparte pro skipo de profesiaj instruistoj. Por gvidi Cseh kurson por komencantoj tri horojn tage venis el vintra Beogrado, Jugoslavio, la sperta instruistino Tereza Kapista. Ŝi ankaŭ instruis la duan nivelon kune kun Shirley Gradussov el Okcidenta Aŭstralio, spertulino pri la bezonoj de Aŭstraliaj progresintoj. La trian nivelon Shirley Gradussov dividis kun fama gramatikisto, Marcel Leereveld de Melburno mem. Je la kvara nivelo instruis plej kapabla duopo, Marcel Leereveld pri gramatiko, kaj la mondfama verkisto kaj instiga instruisto Trevor Steele de Aŭstralio sed nuntempe loĝanta en Kaunas,

Litovio.

Esperanto-Federacio de Viktorio kaj Melburna Esperanto Asocio Inc. aparte fieras pro kunlaboro kun la nova UEA Komisio de Oceanio per partoprenigo de la unuaj reprezentantoj el Papua Nov-Gineo, Sarah Sepoe kaj Stanley Snam Iko kaj el Samoo, Joyce Tamasese. Mencindas ankaŭ ke Sarah Sepoe kaj Stanley Snam Iko estas partoprenintoj en la unua kurso en Nederlando de Projekto Indiĝenaj Dialogoj. Por helpi al ili daŭrigi sian laboron proktekti indiĝenajn rajtojn, MEA nun serĉas uzitan komputilon kaj retaliron en PNG.

Post la kursoj, praktikado de la lingvo mem en amika Esperanto-etoso ege gravas por pliprofundigi la sciojn. Tiel posttagmeze tra la tuta semajno elekteblis el tre diversaj

okupiĝoj: Cseh-seminario “A”, unua paŝo al diplomo de Cseh-instruisto — Jennifer Bishop 2. Komunikado per kantado — Suzanne Holton 3. Kree-ma verkado — Ronald Gates 4. Plua studado por progresintoj — Bernie Heinze, Hazel Green, Bob Felby 5. Preparado por baza kaj meza ekzamenoj de AEA — Marcel Leereveld

La distran vesperan programon preparis Bernie Heinze. Ĝi inkluzivis interesajn prelegojn de Ralph Harry, emerita Ambasadoro de Aŭstralio; Kep Enderby, Prezidanto de UEA; Peter Ellyard, profesoro akcesora de Universitato de Suda Kvinslando; Rainer Kurz, prezidanto de Germana Esperanto Asocio; kaj Dimitar Hadjiev, emerita diplomato de Bulgario. Por iom aktivigi la homojn, Bernie Heinze kaj Franciska Toubale per antaŭdancoj plurfoje aliris multajn sur la danĉplankon por ĝui popoldancadon. Unu vesperon estis permesate ekstari unuope sur skatolon kaj deklami skandaleme kion ajn pri kiu ajn temo kontraŭ risko de kontraŭa opinio kaj ridego. Alia tradicio, planti arbon por paco markitan per ŝildo okazis la duan fojon en la bela ĝardeno de la kolegio. Merkredon posttagmeze okazis ekskurso al la ege interesa Muzeo de Enmigrado de Viktorio kaj al la nova Akvario enhavanta ĉiajn speciojn de fiŝoj trovataj en la akvoj de Viktorio, maraj, riveraj kaj lagaj. Dum la semajno, MEA kaptis oportunon honori per festomanĝo unu el siaj grandanimaj kaj malavaraj membroj, Errol Chick, longtempa kaj sperta prizorganto de la kaso kaj fidela instruisto ĉe la Melburna Esperanto Societo. Sabaton

vespere kelkaj grupoj reprezentantaj la diversajn Aŭstraliajn provincojn regalis per teatraĵeto kaj kantado konkurante por impona ŝildo. Viktorio gajnis per teatraĵeto kaj Suda Aŭstralio per amuza kanto. La tuta afero finiĝis per bongustega festomanĝo kaj disdonado de merititaj atestiloj kun interkonsento renkonti’ĝi denove venontjare en Perto.

Ĉe la jarkunveno de AEA, pro emeritiĝo de Prezidanto Ronald Gates kaj de la kasistino Margaret Inglis, estas elektita nova estraro, kaj oni nomumis reprezentantojn de la diversaj partoj de Aŭstralio.

Nova komisiito pri la nacia Esperanto-biblioteko en Kanbero estas serĉata. Nova komisiito pri la Libroservo estas serĉata.

Estis anoncote ke en 2002 La Somerkursaro de Aŭstralio Esperanto-Asocio okazos en Perto. Pli da detaloj estas troveblaj ĉe:

www.esperanto.org.au/

La Medaliono Torr estas aljuĝita al Dianne Lukes. Oni donas la medalionon ĉiun duan jaron al tiu instruisto kiu instruis la plej grandan nombron da novaj lernantoj en la dujara periodo.



**POR RIDIGI
VIN**



Kion diris la erinaco renkontinte kakton?
Saluton panjo!

[El *Tamen Plu*]

IMPRESOJ PRI LA SUMERKURSARO

Intervuis kaj kompilis
Sandor Hovarth

Debra McCarney:



La somerkursaro estas bona oportuno esti kune kun aliaj Esperantistoj de la orienta parto de Australio, de Nov-Zelando kaj de aliaj landoj.

Mi estas kontenta pri la instruistoj. Mi nur volis fari pli ol mi povis. Mi ĝuis la paroladojn vespere.

Mi trovis ĉi tie ke ni devas bone organizi multe antaŭe, por la venonta Somerkursaro en Perto.

Kelkaj menciis al mi ke ili ne ricevis informojn pri siaj aliĝoj kaj ili volas ricevi pli da informo pri la programo tuj. Do mi pripensas fari komputiloprogramon kiu povas kolekti la informojn kaj tuj sendi respondon.

Mi ankaŭ pensas pri organizi la kursojn iomete alimaniere. La vetero povus esti tre varma. Eble havi ekskursojn frumatene kaj lerni dum la tago en la klimatizataj klasambroj.

Bradley McDonald:



Ĝi estas mia 4-a Somerkursaro. Fakte mi estas kontenta. Mi ĝojas ke mi ĉeestas. Por mi la plej grava parto estas partopreni en la Cseh-semina-

rio. Tio estas sufiĉe da laboro en si mem. Bedaŭrinde mi devis flankenlasi aliajn klasojn. La posttagmeza kaj vespera programoj plaĉas al mi. Sufiĉe ofte mi vizitis aliajn lokojn en Melburno. La eksterlandanoj ĉiam aldonas apartan valoron, precipe Tereza ĉi-foje. Mi neniam antaŭe renkontis iun el Jugoslavio.

Malbonaĵoj? ...La unua tago estis iomete ĥaosa kaj konfuza. Mi ne tre bone orientiĝis tiam. Do estis malŝparo de tempo.

Ni en Nov-Zelando devas prizorgi la lernadon de Esperanto inter la homoj de la Sudpacifiko.

Kris Krageloh:



Ĉi tiu estas mia unua Somerkursaro. Mi ŝatis ĝin. Mi povis esperantumi. Estis eta Esperantio, ĉu ne? Mi renkontis multajn interesajn homojn. Mi ankaŭ povis traŭri la mezan ekzamenon. (Fakte, mi devas studi nun.) La ekzameno instigas min lerni.

Mi ŝatas ke oni havas kelkajn instruistojn. Oni povas elekti. Estus pli bone se pli da junuloj estus ĉi tie. Eble oni povus oferti pli da agadoj (ekskursoj, festoj) por junuloj? Ofte ne estas tre klare kio okazas. Ekzemple mi ne scias kie mia ekzameno okazos. Ankaŭ, mi preferus nur loĝi kaj ne manĝi ĉi tie. Mi tre ŝatas vidi ke la Indiĝenaj Dialogoj vere funkcias kaj ke mi renkontis kelkajn indiĝenajn homojn. Mi preferus ke oni vendu pli da materialoj pri Esperanto. Mi rimarkis ke malmulte da homoj havas stelojn, flagon, T-cemizon, sa-

kon...

Les Farkas:



Mi ŝatas la programon, la klasojn. Estas facile lerni en la klasĉambroj. La instruistoj estas tre bonaj. Ili havas bonajn metodojn. Mi ŝanĝus neĝion por la venonta Somerkursaro.

Jo Horton:



Mi tre ĝuas la lecionojn de Tereza. They are well structured. She is well organised.. She presents it beautifully. She is a terrific role model. She is going at the right pace for most people. In the other lesson I miss the structure a bit. After the "introduction" of the options, many of us were very lost and confused. In the end I ended up going to no option. It could have been laid out a lot clearer. I was ready to go Saturday morning and nothing much happened till the afternoon. The building is terrific. The gardens are belaj kaj mi tre ŝatas niajn novajn amikojn. I'll give it 75%. I'm glad I came.

Trish Raouf:



Ĉefe la somerlernejo estas tre sukces-

sa. Mia Esperanto ne estas tre bona, tamen...

There are mainly positives: plenty of people. About 80. Like 2 years ago. There is a lot of camaraderie and it's just wonderful. Tereza is very good and very concise.

What's bugging me? All the fluent Esperantists seem to stick together and don't seem to worry about the beginners. There should be more interaction between the two groups. A good speaker could be matched up with a weaker one.

Sarah Sepoe:



Mi pensas ke la Somerlernejo estas bona por mi, ĉar..after participating in the Indiĝenaj Dialogoj project in Europe it was great to reconnect with Esperantists. I'm very grateful to the Melbourne Esperanto Association for inviting me. I'm very happy to be here. It's good to be here and to speak Esperanto. I still need a lot of training. The course itself is very good. I like Tereza, the teacher from Yugoslavia. Her method is very good. It's a lot better for the teacher to speak mostly Esperanto to the students. I would have liked more singing. It motivates me. Often in the afternoons I got a bit bored. There also needs to be more interesting things for young people.

Marg Whelan:

I am really enjoying the lessons. For me it's a new thing altogether. It's quite rewarding. I went through a steep learning curve. I learned a lot in a very short time. I can follow a lot

of conversations, and this only after 4 days. Not that Esperanto is easy, but it is less of a challenge than I thought. It somehow seems all very familiar. I like the style of the direct method. Once you settle into it, it gets easy for me. English in another class can be a surprise after a good direct method lesson. Still, I think both styles are necessary.



Things that could be improved? First, I found it very confusing and frustrating. If I turn up somewhere and things aren't organised and structured initially, I get a bad impression which is hard to reverse. Plus, not everybody speaks Esperanto. Not everybody who does is sufficiently fluent. Please speak it at your level, but do try to pull the others along. Everybody needs to know what's going on. For that all the announcements have to be in Esperanto AND English. People at the tables just don't translate.

Still, the food is nice, I am glad I came and I'll keep it up.

Helen Palmer:



Mi pensas ke la Melburna Somerlernejo estas bona kaj mi tre ĝuas ĝin, ĉar mi lernas multe da Esperanto kaj mi ŝatas kunesti kun aliaj Esperantistoj. Mi ŝatas la lecionojn. Eble ni povus esti iomete pli aktivaj

dum la lecionoj por movi la sangon en niaj cerboj, eble stari aŭ fari jogon.

Mi tre ŝatas paroli nur per Esperanto. Tio estas tre bona. Mi ne ŝatas — eble — la multajn paroladojn pri “blondulinoj, seksumi, mamoj...”.

Helen Webb:



I will speak in English. It has been interesting to finally start to learn Esperanto. I do enjoy learning languages. It will be good to try it with Terry afterwards. I have enjoyed the two different teachers I had. After Tereza's lessons the Esperanto words keep running around in my head. She moves you along quite fast. Shirley's is a bit more relaxed. I enjoy La granda Mazi. Personally, I don't like to sit in a class for that long. Also, I'm sorry I missed out on the music and singing in the afternoon.

Pat Palmer:



This is my first summer school ever. I'm quite enthused. Just being with such a large group of people who speak Esperanto. I like the teachers. That felt good. I really like the singing and the games. They are good for your confidence. Sometimes I got slightly annoyed when teachers go off the track for too long. I tend to get a bit irritated in that situation. Also, the announcements and talks are just too difficult for the beginners to un-

derstand. The beginners might be discouraged if they keep not understanding things.

Maurice Nicholson:



This is my second summer school. I want to continue learning it. I am learning Esperanto so I can communicate with more people. This course is good, maybe a bit unorganised at the beginning. The teachers are great. I'm quite happy with the afternoons and the evenings. Some people weren't on time. Apart from that, it's great. I do like the dancing. Learning Esperanto has also helped me to communicate better with other people.

Why should Aborigines learn Esperanto? This way they could find out a bit more what is happening in the world and they might be able to talk to other Indigenous people. I know, Koories have many other problems.... If you come along, learn Esperanto and hear about other problems, your problems might not seem so big. I will stay in touch with the Indigenous people from Papua Guinea. They do have many similar problems.

“Tajfuno” – Su Hyon

Estas bone renkonti homojn de aliaj landoj. En Koreo mi ne havas multe da ŝancoj paroli en Esperanto ĉiutage. Mi partoprenis en du somerkursaroj en Koreo. Ili estas ege similaj al la nuna, sed ili daŭras nur tri tagojn. Mi estas kontenta pri la instruistoj. Mi ege ŝatas ilin. Trevor estas ege gaja. Li certe scias kion li instruas.

Marcel havas multe da spertoj. □

OMAGĜE AL EROL CHICK de Paul Desailly

Mi volas esprimi miajn dankojn al Erol Chick, ne nur pro tio ke mi estas dum ĉi tiu Somerkursaro lia gasto en Sandringham sed ankaŭ menciindas ke antaŭ dek jaroj tie ĉi en “mirinda” Melburno li estis mia unua instruisto de la Internacia Lingvo. Jes ja mi uzas la vorton “instruisto” substrekante la sufikson “isto” ĉar li bone kaj profesie preparis lecionojn. Tre feliĉaj grupetoj tiam studis kun Erolo, Fay, Herbert, kaj Marcel.

Erolo Esperantistigis la 2an de februaro 1976. Li forte subtenis kaj ankoraŭ subtenas la ideon de monda komunikado. Tiu ĉi ideo fontas, mi supozas, el lia subteno longedaŭra de la radio-amatoroj en diversaj partoj de nia planedo. Post precize du semajnoj Erolo rajtos pretendi ke li de kvaronjarcento aktivas en nia movado.

Ne tro gravas la fakto ke Erolo jam havas 83 jarojn. Mi povas atesti ke li ankoraŭ ĝuas bonan sanon; eble ne tiel fizike forte kiel en la pasinteco sed li ankoraŭ inteligente kaj sprite konversacias. Rilate al lia saĝeco, ni Melburnanoj estas dankemaj ĉar li konstruis fortan financan fundamenton por la Melburna Esperanto-Asocio kiam li estis nia kasisto, kaj poste kiel subtenanto li tre malavare donacis. Ne malmultaj el vi rimarkis kaj komentis ke la Esperanta movado en Melburno estas finance stabila. Mi esperas ke li estos dumviva membro de la Melburna Esperanto-Asocio.

Ni rajtas danki kaj honori Erolon ĉar li grave rolis por nia komuna kaj unuiĝinta sukceso. Bonvolu kun mi tosti lin ke li ĝuu daŭrajn sukcesojn kaj feliĉojn. □

“BRUOJ” DE LA SOMERLERNEJO



Laŭ *Telopeo* februaro 2001

LA SAPSKATOLO komentas Franciska Toubale



Hazel Green

La tradicia sapskalo, kies malpezecon kaj humuron la ĉeestantaj eksterlandanoj ne ĉiam komprenis, fariĝis denove sukcesa ĝojiga ero de la somerkursara programo. Laŭ la peto de la ĉiama estro de la aranĝo, Bernie, Henry proponis “arbaro” kiel

pratemon.

Por Ralph la solvo evidentas: pro tio ke Esperantistoj kutimas planti arbojn kiam ajn ili organizas gravan renkonton, ni Esperantigu la tutan mondon kaj tiel rekreos la perditajn arbarojn.

Logike tiu temo kondukis al alia grava temo: “akvo”. Hazel, akuzante politikistojn, ĉefe Bon-Hawk-on, pro enlaso de tro da enmigrantoj, reagigis Kep-on.

Kompreneble, Marcel akuzis la virinojn. Pardonu min, sed mi daŭre ne kapablas kompreni tiun viran logikon, kiu ligas la problemon al la mamoj de virinoj. (!!!)¹ Ĉu kon-



Paul Desailly

¹ Verŝajne la *eks-terlandanoj*, t.e. la maruloj, havas alian logikon pri la akvo ol la teruloj. (Vidu la duan-trian linion de la teksto.) — Odlo B.

solas nin scii ke ankaŭ la Ĉinoj (laŭ Paul), la Jamaikanoj (laŭ Shirley), la Alĝerianoj (laŭ Franciska) suferas pro problemo pri akvo?

Henry proponis ŝpari akvon unue en la necesejo: ni metu la fekon en sakan, tute simple.

Sandor preferis trakti la problemon de importita besto kiu ankaŭ damaĝas la medion: la ŝafo.

Mi ne dubas ke se la decidistoj povus aŭdi tiun pozitivan debaton, ili multe lernus. Mi ankaŭ konscias ke mi ne kapablis enkapigi ĉies proponojn kaj petas pardonon de tiuj kiujn mi ne menciis.

Mi esperas ke ni denove rekonstruos la mondon pervorte en Perto.

Ĝis venonta jaro. □

EL LA REGIONOJ

Brisbano:

Je la 9a de decembro okazis la Zamenhofa Festo por la Brisbana Esperanto-Societo ĉe la domo de Alan Grant. Estis varma tago, do kelkaj el ni kontente naĝis en la naĝejo de Alan. Tiam ni "piknikis"; pro la tre varmega sunbrilo, ni ne piknikis en la ĝardeno, sed decidis manĝi interne, sub la ventumilo.

Post la manĝado, ni vizitis la bibliotekon de la Brisbana Esperanto-Societo kiu nun troviĝas en ĉambro ĉe Alan. La komitato diskutis pri la libro kaj decidis okazigi "tagon de la libro" ĉiun duan monaton, por ke membroj pruntedonu librojn. La dato de la venonta "librotago" estos decidita de la komitato kaj estos presita en la venonta eldono de Brisbana Babilado.

[Laŭ Brisbana Babilado]



**POR RIDIGI
VIN**



Antaŭ multaj jaroj junulino kun bebo en siaj brakoj eniris viandovendejon. Ŝi diris al la buĉisto: "Vi estas la patro de tiu

ĉi knabeto, kion vi intencas fari pri tio?"

Konsiderinte iom longe la buĉisto fine diris: "Mi donos al vi senpagan viandon ĝis la knabo atingos sian 16-an naskiĝtagon!"

La buĉisto estis kalkulinta la jarojn, kaj iun belan tagon la dekkelkjarulo, kiu ĉiusemajne venis por la viando, diris: "Mi estos 16-jara morgaŭ!"

"Mi scias", respondis la buĉisto. "Diru al via patrino ke tiu ĉi estas la lasta viandajo kiun ŝi ricevos senpage de mi, kaj ne forgesu rigardi ŝian vizaĝesprimon!"

La junulo faris tion, kaj la patrino ridetante diris: "Reiru al la buĉisto kaj diru al li ke mi la pasintajn 16 jarojn ricevis ankaŭ senpagan panon, lakton, fromaĝon, fruktojn kaj legomojn. Kaj ne forgesu rigardi lian vizaĝesprimon!"

◇◇◇

Fosis Ĉinaj sciencistoj 50 metrojn en la teron kaj trovis eretojn de kupro. Longan tempon studinte la eretojn Ĉinio fine anoncis ke la praĉinoj antaŭ 25 000 jaroj havis tutnacian telefonreton.

Tio, kompreneble, ne imponis la Rusan registaron. Ĝi tuj ordonis al siaj sciencistoj fosi eĉ pli profunden. 100 metrojn mal-supre ili trovis eretojn de vitro, kaj tuj anoncis ke la prarusoj jam antaŭ 35 000 jaroj havis tutnacian fibro-reton.

Tio, kompreneble, furiozigis la Usonajn sciencistojn. Ili fosis 200 metrojn en la teron, kaj trovis nenion! Fiere ili tuj anoncis al la tuta mondo ke la prausonanoj jam antaŭ 5 000 jaroj havis portebajn telefonojn.

[E] *Tamen Plu!*

PEAA PREZIDANTO TUTMONDE HONORITA PRO SIA KONTRIBUO AL LA SCIENCO

de Odlo Boksepr



En januaro disvastiĝis tra la tuta mondo la informo ke la prezidento de la Antarktika Esperanto-Asocio, P. Ŝancelmarŝulo, montris al vizitantaj sciencistoj la specialan valoron de ŝancelmarŝado.

“Ĝis nun ni nur mokadis la ŝancelan marŝadon de tiu pingveno,” diris reprezentanto de la studkomisiono, “Sed P. Ŝancelmarŝulo proponis ke ni science studu lian ekvilibron dum lia marŝado, kaj komparu lian energielspezadon kun la energielspezo de niaj komisionanoj dum ni marŝas sur la sama tereno.”

Mirigis la sciencistojn la trovo ke la energielspezo de P. Ŝancelmarŝulo estis grave malpli ol tiu de la Kuiristo de la Studkomisiono, dum ili apude transmarŝis la tricentmetran distancon inter la Kuirlando kaj la rando de la akvo.

En la akvo, P. Ŝancelmarŝulo pruvis ke li ankaŭ kapablas multe pli lerte kapti fiŝojn per sia buŝo ol la Kuiristo.

Post la reveno de la Kuiristo kaj P. Ŝancelmarŝulo, dum la Kuiristo penis sekigi sin per glaciigitaj viŝtukoj, la apudrigardanta pingvenaro fureore aplaudis P. Ŝancelmarŝulon. Ili tuj lin elektis Prezidanto de la PINGVENA ESPERANTO-ASOCIO ANTARKTIKA.

La prezidinto, nun ekŝiĝinta, ĵetis

duone maĉitan fiŝon al P. Ŝancelmarŝulo, kiu kaptis ĝin per sia beko starante sur nur unu piedo, kio pli mirigis la rigardantan sciencistaron.

Post tiu ceremonio, la sciencistoj eniris la manĝotendon, kie ilin atendis glaciigitaj frititaj ovoj kaj glacikuboj el Aŭstralia vino.


Intervjuate de la mondinformagentejo CNN, la prezidento de PEAA, P. Rektstarulo, diris ke malsimile al aliaj Esperantistoj, li ne povas

flugi. (Nia raportisto komentas ke verŝajne estas pro la alta kosto de bileto; aviadinstruireprezentanto informis nian raportiston ke flugbileto inter Antarktiko kaj Aŭstralio kostas “vere tre multe da fiŝoj”).¹ P. Ŝancelmarŝulo konfirmis ke ankaŭ li ne povas flugi. Kune ili planas naĝi al la UK en Zagreb, se tute libera marvojo tien estos trovebla, kaj se UEA povos certigi al ili neĝdomon por loĝado dum la kongresmajno.

P. Ŝancelmarŝulo diris ke li partoprenis en 379 UK-oj ĝis nun, kaj li esperas ĝui ilin dum multaj jardekoj pli.

David Attenborough ne deziris komenti. Sed lia sekerretario diris “Ĉu?” kiam ni demandis al ŝi pri la deklaro de P. Ŝancelmarŝulo. □

¹ La aktuala kurzo (16 jan. 2001) estas: unu kilogramo da fiŝoj = \$8 Aŭstraliaj dolaroj, laŭ la flugkompanio Qantas.



Nekutima mapo pri la Suda Poluso, kun Aŭstralio, Nov-Zelando, kaj la sudaj pintoj de Afriko kaj Ameriko. El *La Geographie Universeille* de Pierre Duval, 1676. Laŭŝajne, la mapo estis derivita el mapoj preparitaj de lia onklo Nicolas Sanson.

LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: *Jennifer Bishop*, 39
Hill St, Hawthorn Vic 3122.
☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806
(BH) Fax: 03 9905 3668 (BH).

esperanto@education.monash.edu.au

Vicprezidantoj:

Franciska Toubale, 1 Marne Rd, Mt
Evelyn Vic 3796.
franciska@bigpond.com

Hazel Green, 44 Toowoomba Rd,
Oakey Qld 4401.
hazgreen@tmba.design.net.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81
Francis St, Brighton SA 5048.
abcetc@ozemail.com

Vicsekretario: *Bob Felby*, 6 Dorset
St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham
St, Hawthorn Vic 3122.
Pitney@Cybernetint.net

Vickasisto: *Frank Braham*, 5 Marri-
ot Rd, Moorabbin Vic 3189.
fbraham@aol.com

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO
Box 12 103, Auckland 1135.
☎ 09 579 4767, faksilo 09 579 1070.
neelam@voyager.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt* PO
Box 8140, Symonds Street, Auckland
1035, New Zealand.
☎ 09 626 6129.
hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, PO Box 8140,
Symonds Street, Auckland 1035.
☎ 09 817 8244.
brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5
por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20
por studento aŭ pensiulo; asocia mem-
breco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon
al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney,
57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza
paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-
jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu
sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie
Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auck-
land 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj,
AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj,
\$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la
Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En
Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe
ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la
konto aeal-w de la Libroservo de la
Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©
2001 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia
en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la*
Suda Kruco estas ©2001 de la Aŭstralia
kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj.
Represo de enhavaĵo estas permesata,
kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas
kompostita kaj aranĝita de Donald
Broadribb per iMac DV SE, la pro-
gramo uzita estas FrameMaker. La tip-
aro uzita estas New Century School-
book. La reteldono estas preparata per
Power Mac 7200, kaj Acrobat.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmismoj

Vera Doloro, L.M.K.

[lia multsuferanta kontrolanto]

Esperanto in Forestry by Sylviane Lafargue

A special seminar was held on October 6, 2000, at the world renowned Eberswalde Institute of Forestry in Berlin, where forestry has been taught since 1830. The Seminar was dedicated to Dr Karl-Hermann Simon, the leader of the multilingual forestry dictionary project LEXICON SILVESTRE. Dr Simon celebrated his 70th birthday on September 30. For nearly two decades he has been guiding the preparation of the multilingual dictionary. Part 1 has been published in 10 languages (Esperanto, Croatian, Czech, English, French, German, Latvian, Polish, Rumanian, Turkish). Part 2 in Esperanto, Czech, German, and French. Part 3 has so far been published in Esperanto and German, as will also be part 4. Editions of all four parts in other languages are in preparation.

The primary language for definitions is Esperanto. Concepts in the dictionary are assigned numbers, allowing for a very flexible use of the individual volumes. 4000 terms have been prepared so far, with more to follow. In the first phase only Esperantists took part, later a considerable number of non-Esperantists was added.

Esperanto is the primary working language for the project. The bulletin of the LEXICON SILVESTRE SUPPORT SOCIETY is published also in German, English, and French. At present over 100 persons with about 20 language backgrounds are in the team.

[Translated from *Eventoj* #200, 2/dec. 2000]

International Association of Professors Accredits AIS

by Reinhard Fossmeier

The INTERNATIONAL ASSOCIATION OF UNIVERSITY PROFESSORS AND LECTURERS (IAUPL) has confirmed the membership of the AKADEMIO INTERNACIA DE SCIENCIOJ. Official approval was given during the autumn IAUPL meeting in Paris, to which AIS presented a paper on the situation of virtual universities. This is an important recognition of AIS outside the Esperanto movement, since IAUPL is a renowned association in consultative relations with UNESCO. Recognition of AIS was due primarily to the personal reputation of its members.

[Translated from *Eventoj* #200, 2/dec. 2000]

[AKADEMIO INTERNACIA DE SCIENCIOJ is officially registered in the Republic of San Marino, a tiny nation within the geographical confines of Italy. Although not technically an Esperanto organization, AIS holds intensive courses and seminars on various scientific specialities principally in Espe-

ranto, in various parts of the world, several times each year. Membership in the AIS is limited to University professors and lecturers in accredited national universities.]

Our Translation Competition 2001/1

This competition genuinely had our competitors racking their brains for some of the expressions, and we congratulate them all for their ingenious and sometimes quite innovative suggestions.

But our hats off to Patriŝa Harkin, whose very succinct contribution reads as follows:

Mi legis ke oni devas traduki nek vortojn, nek vortarojn, sed nur ideojn, do jen mia konkursa solvo:

“Karaj Konsilantoj,

Mi skribas koncerne najbarajn hundojn, kiuj vagas sur mian bienon, fekas kaj manĝas la nutraĵon de mia kato.

Bonvolu informi min, kiajn klopodojn vi faras por trakti ĉi tiun gravan problemon en la Ŝerbruk-regiono.”

Well, for conciseness that certainly must score pretty highly; and she makes a very good point, as well. Our only criticism would be that “Konsilantoj” is not a good term for translating “Councillors”¹ as a political term. For the most part, in practice Shire Counsellors do not counsel, but discuss and make local laws and decisions. *PIV* provides the term “Konsilianoj” and defines KONSILIO thus: “Administra organismo, jen kun decida, jen kun konsulta kompetenteco, plenumanta diversajn funkciojn en registara aparato aŭ grava privata entrepreno”. Benson also gives this term for “council”.

Those who contributed complete translations were Fran Barič, Henry Broadbent, Ron Ritchie, Franciska Toubale, Edna Turvey, and David Whitmore. Because of the difficulty of the translation task, and the overall high quality of the translations, all of the above have been sent book prizes. We found the translations by Franciska Toubale, David Whitmore, and Edna Turvey nearly flawless and especially worthy of mention.

Ablutions: Most of the contributors had trouble with “ablutions”, and translated it as “lavado”. While this is the literal meaning of the word, it is inappropriate in this context (which does *not* refer to the dog washing itself). If the euphemism is to be retained in the translation, perhaps “malplenigi la intesto(j)n” would be best. Otherwise, just “feki”.

¹ Granted, this word was misspelled as “Counsellors” in the original English text which was a verbatim copy of the original letter actually sent to the Shire Council by the anonymous author.

Translations for “garden hose” varied a bit, but none was really fully adequate. *PIV* does indeed include this meaning as one of the meanings of “tubo”, but unfortunately since “tubo” can also refer to water pipes, among other things, misunderstandings are very probable in the context in which it appears. Perhaps “*kaŭĉuka tubo*” would be more appropriate here.

Treni: Most of the contributors failed to notice that “treni” (to drag) is a transitive verb in Esperanto: “oni *trenas* la kaŭĉukan tubon”; but “la kaŭĉuka tubo *treniĝas* sur la tero”, i.e. “is dragged”.

Its, his, her, their cause problems for many English speakers using Esperanto, and not just beginners. A good rule of thumb is: If you are saying that So-and-so does something to/with its/his/her/their something”, the correct translation is “sia” — or “sia(j)n” if grammar requires. Ĝia/lia/ŝia/ilia generally start a sentence, or form part of the subject of the sentence; otherwise, they emphasize that someone other than the person being talked about is meant.

For example, *Ili amegas siajn hundojn* (“They love **their** dogs immensely) and *Unu el la hundoj estas... atakema (ne al siaj posedantoj)* (One of the dogs is aggressive (not to **her** owners”) are correct translations, and follow the rule of thumb given above.

With “three keep **their** dog inside **their** fence”, the same rule of thumb applies: “*tri tenas sian hundon malantaŭ sia barilo*”.

Fence and **wire netting** caused a few translation problems. *Barilo* for “fence” is the simple translation and its specific meaning is obvious in the context, even though it can refer to any kind of barrier. *Dratreto* is good for “wire netting” and most contestants got it right.

Gate can be a real problem for translation. Many of the contestants used *pordego*, but this word literally means “a gigantic door” and is perhaps appropriate for the “city gates” of an ancient fortified city, or of a major monument, but hardly for a fence. Since the gate in a fence is simply a door set into the fence wire, *barilpordo* is probably the simplest translation for our context, and is the term Benson’s dictionary recommends.

Pound (for animals): Benson suggests “bestogardejo” and several of the translations used this. *Bestotenejo* would do equally well in the context.

Shire of defeated most of the contestants. “Shire” is best translated *distrikto*, in Australian usage. It is not a *provinco*, which best translates the Australian word “State” as in “State of Victoria”. The “of” is not to be translated. Sherbrooke, Victoria, Avon, and numerous other regional names are proper names and in Esperanto follow immediately on the modifier: Thus, *la Distrikto Sherbrooke, la Provinco Victoria, la Distrikto Avon*.

FOR BEGINNERS

One of the most difficult things for beginners to learn, both in writing and in reading Esperanto, is good, simple style. Good Esperanto style varies a great deal from traditional English writing style, and much that we take for granted in English is inappropriate for Esperanto; similarly, much good Esperanto style is rather poor if put literally into English.

“I” and “me”: For example, was it drilled into you in school that the words “I” and “me” should always come second if accompanied by another pronoun? Such as: “My sister and I both enjoy reading crime novels” (and *not* “I and my sister both enjoy...”). In Esperanto this “rule” is not customary, and the sentence “Mi kaj mia fratino ambaŭ ĝuas legi krim-romanojn” is perfectly good style.

The long forms of verbs: Another problem beginners face is learning to avoid the long forms of verbs. In English we regularly make such sentences as “I have visited there often”, or “What book are you reading?” Good Esperanto style requires the simple forms of verbs for such sentences: “Mi ofte vizitas tie” and “Kiun libron vi legas?” A fairly trustworthy rule for verbs in Esperanto is: if in doubt whether or not to use a long form, don’t.

One way to become familiar with good Esperanto style is to read works by the best Esperanto stylists. If you enjoy novels, Serĝo Elgo’s recent *Surklifa*, Trevor Steele’s several novels and short story collections, Ron Gates’ novel *La vidvino kaj la profesoro*, are some recently published works with a particularly good Esperanto style. You will need to have a dictionary handy, such as M.C. Butler’s *Esperanto-English Dictionary*, but ploughing through these books will not be terribly difficult, and the books are highly entertaining as well.

Punctuation is often troublesome for beginners, partly because there is no standard system of punctuation in Esperanto. The familiar English language systems of punctuation are usually acceptable in Esperanto writing, although Esperanto writers tend to break up very long sentences by using commas more frequently than we are used to in English. On the other hand, some European writers tend to separate out almost every phrase and sub-phrase by using a comma, which can confuse readers of Esperanto.

Decimal marks: In the English speaking countries we are used to expressing a decimal by placing a dot before the decimal. So we write: \$32.05 where a European would write \$32,05; and, more confusing to us, where we use commas to divide sets of thousands, the European uses dots. So our 32,000 (=32 thousand) is 32.000 in European usage. It might be best to avoid confusion by writing simply 32 000 for the thousands.